

**JURA
TRIBUNO
INTERNACIA §**

N-ro 21

Jaro 2022 : 1

Internacia Jurista Esperanto-Asocio



Eldonita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta adreso: Jura Tribuno Internacia
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

ret-adreso: jurista@esperanto.ac

Direktoro: José M. Rodríguez
Kunlaborantoj: D-ino M^a Rafaela Urueña Álvarez (Hispanio)
Advokato Miguel Faria de Bastos (Portugaliao)
Alejandro Burgos Escalante (Hispanio)

ENHAVO

Paco, Justeco kaj Neŭtraleco	3
Vivo de la Asocio	5
Boliviamar, la ne-solvo al la bolivia mar-alira afero	10
Jura rilato inter la Kanada ŝtato kaj ĝiaj aborigenaj popoloj. La starigo de Nunavut	16
Juraj informoj	23
Robotoj, rajtoj kaj devoj. La vojo al ekelektronika personeco	28
Novelo: <i>La kazo de la malklera tatuisto</i>	33
Jura Vortaro	39
Galerio de Elstaraj Juristoj	
<i>Maria Pontika</i>	42
Kino kaj Juro “ <i>Atestanto de la Prokuroro</i> ”	43
Aliĝo al IJEA	46

Paco, Justeco kaj Neŭtraleco.



Rusa agreso kontraŭ Ukrainio daŭras kaj okaze de ĝi, terura homarano krizo. Proksimume 30% el la ukraina loĝantaro deslokiĝis, la plejmulto el ili eĉ devis forlasi sian landon. Krome, tiuj kiuj suferas la plej gravajn konsekvencojn de la milito estas la malfortuloj. Paco ŝajnas esti malproksima.

Lastatempe oni diskutas pri la necesa neŭtraleco de la esperanto-movado en ĉi tiu milito. Tamen, ĉu vere estas necese adopti neŭtralan pozicion fare de neŭtrala movado?

Tutcerte ni, esperantistoj, ĉar homoj, sekvas niajn proprajn politikajn, religiajn kaj sociajn ideojn, ĉiuj ili libere elektitaj. Vere ne estas devige esti pacisto se ni estas esperantistoj, ĉar esperanto estas lingvo, kaj en nia lingvo, kiel en ĉiuj aliaj idiomoj, oni povas diri frazon kiel "mi amas pacon" kaj ankaŭ alian tute kontraŭa. La Deklaracio pri Esenco de Esperantismo de la jaro 1905 tion asertas: *Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kia celo.* Do, tute ne estas devige sekvi konkretan politikan idearon, eĉ se pacisman, ĉar bonŝance ni estas tute liberaj.



Akuŝejo bombardita kaj detruita en Ukrainio

Tamen, se oni parolas pri internacia asocio, ĉu ĝi rajtas esti neŭtrala? Kompreneble jes, se oni diskutas pri internaciaj aferoj kiuj ne okazigas militojn aŭ perfortajn agadojn. Sed, se atentite la artikolon 2-an de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, tiam estus necese forlasi tian neŭtralecon. Tiel:

La Membroj de la Organizaĵo devas solvi siajn internaciajn disputojn per pacaj metodoj tiamaniere, ke nek la internaciaj paco kaj sekureco nek la justeco endanĝeriĝas.

La Membroj de la Organizaĵo devas sin deteni en siaj internaciaj rilatoj de la minaco aŭ la uzo de perforto ĉu kontraŭ la teritoria integreco aŭ politika sendependeco de iu ajn ŝtato, ĉu en iu ajn alia maniero nekonforma al la Celoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Alie, E-asocio devas rigardi jenan militon per zamenhofaj okuloj, tio estas, sur la batalkampo kaj ĉe la bombarditaj urboj ne estas rusoj aŭ ukrainoj, sed homoj kun homoj, aŭ pli bone dirite, homoj amasbuĉitaj de registaro kiu uzas sian armean forton brutale kaj senmezure. Kaj ĉi ĉio estas tute kondamnenda.

Kompreneble, protesti kontraŭ la nuntempa rusa agreso ne povas esti realigita samnivele en la paca Eŭropo, en la fora Ameriko ol en Rusio. Estas necese agnoski, ke diri NE al la milito en Moskvo povus signifi arestojn kaj personajn damaĝojn. Do, neniu rajtas peti tian oferbuĉon al rusa esperantistaro. Tamen, en la cetera mondo, E-asocioj, kvankam kun minoritata kaj preskaŭ ne-aŭskultebla voĉo, ne devas ĉesi peti tujan PACON, ĉar homoj -multaj el ili infanoj- suferantas kaj poste postuli JUSTICON, ĉar krimoj ĉiam kaj ĉie estas punindaj.

*José María Rodríguez
Direktoro de "Jura Tribuno Internacia"*





Vivo de la Asocio

IJEA KUNLABORIS EN LA REDAKTADO DE LERNO-MATERIALO EN GIMNAZIA KURSO

Fabián Jiménez estas profesoro en la gimnazio "Almenara" en la vilaĝo *Vélez-Málaga*, en la sudo de Hispanio. Ĉi-jare la estraro de la lernejo akceptis lian proponon organizi kurson de esperanto kun akademia valoro por 17-jaraĝaj gelernantoj. La kurso okazos po du horoj semajne. La nomo de la lerno-fako akceptata estas "Esperanto kaj Eŭrop-uniaj Valoroj". Kompreneble, la ĉefa celo de la lerno-fako estas instrui baze la internacian lingvon, tamen oni aldonis ankaŭ sciigi pri la valoroj agnoskitaj kaj defenditaj de la Eŭropa Unio. Ĉi tiu kroma afero faciligis la akcepton de la organizado de kurso de esperanto fare de la estraro de la gimnazio.



Gimnazio "Almenara" en *Vélez-Málaga* (Hispanio)

Kompreneble libro-metodoj pri la lingvo esperanto uzeblaj en tiu lerno-fako estas multaj, tamen ene de ili nenio aperas pri tiu specifa temo de la Eŭropa Unio, tio estas, la valoroj agnoskitaj de la artikolo 2-a de la Traktato pri Funkciado de Eŭropa Unio. Kun la celo faciligi la taskon de la profesoroj, Internacia Jurista Esperanto-Asocio kontaktis kun Fabián Jiménez, ĉefa respondeculo de la projekto. Nia asocio klopodas faciligi la laboron de tiu

profesoro kaj pro tio, ni proponis al li redakti tekstojn kun la lecionoj pri eŭrop-uniaj valoroj. En ĉiu leciono aperas ankaŭ resumo kaj demandaro en esperanto, kune kun la klarigado de kelkaj aspektoj de la lingvo, kiuj povas esti taŭgaj komplementoj por la instruado de esperanto fare de la profesoro mem.

Jen la lecionaroj:

Leciono 1-a: La Konstruo de Eŭropo.

Leciono 2-a: La Eŭropa Unio.

Leciono 3-a: Valoroj de la Eŭropa Unio: La Homa Digneco.

Leciono 4-a: La Libereco.

Leciono 5-a: La Demokratio.

Leciono 6-a: La Egaleco.

Leciono 7-a: La Laŭjura Ŝtato.

Leciono 8-a: La Respekto al la Homaj Rajtoj, inkluzive al Rajtoj de Homoj membroj de Malplimultoj.

IEAJ esperas, ke ĉi tiu materialo certe utilu al la profesoro en la instruado de tiu interesa lerno-fako.

FONDITA LA UNIO INTERNACIA DE ADVOKATOJ ESPERANTLINGVAJ

Kadre de la pasinta Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Montrealo (Kanado), oficialiĝis Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj. La ĉefa celo de ĉi tiu nova asocio estas arigi al kiel eble plej granda nombro de advokatoj kaj advokataj firmaoj scipovantaj la internacian lingvon. UIAE neniel konkurencas kun Interancia Jurista Esperanto-Asocio, pro la fakto, ke tiu nova unio celas nur kunigi al advokatoj, do ne temas pri esence jurista asocio, kiel IJEA.

Se vi deziras koni pliajn detalojn pri la nova advokata unio kaj eĉ aliĝi, ne hezitu viziti ties ret-paĝon ĉe <https://www.uiaeesperanto.com/> Ni bonvenas la advokatan union kaj ekde ĉi tiu revuo ni proponas al ĝi la plej sukcesan kaj efikan kunlaboron por la antaŭenirigo de Esperanto en jurajn mediojn.




JURA SEMAJNO, NIA ĈIUSEM AJNA INFORMILO

Daŭras la ĉiusemajna eldonado de "JURA SEMAJNO", malgranda bulteno de IJEA. Ĉiudimanĉe aperas la bulteno enhavanta ĵusan informon pri juro, ĝenerale elstaraj juĝoj kies kono povas esti interesa por juristoj, kune kun analizo pri jura vorto en esperanto. JURA SEMAJNO estas sendata rete al membroj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.



Justica Palaco en Torino (Italia)
Torino estos la sidejo de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto en 2023





Neutrality helps the oppressor, never the victim.
Silence encourages the tormentor, never the tormented.

Eliezer (Elie) Wiesel (1928 / 2016)
Nobel-Premiito pri Paco en la jaro 1986

*Neŭtraleco helpas la opresanton, neniam la viktimon.
Silento kuraĝigas la turmentanton, neniam la
turmentaton.*

Boliviamar, la ne-solvo al la bolivia mar-alira afero.



Post la naskiĝo de Bolivio kiel sendependa ŝtato en la jaro 1825 ties teritorio havis sufiĉe ampleksan mar-fasadon rigarde al Pacifika Oceano, pli-malpli la marbordo de ĉi tiu sudamerika ŝtato etendiĝis tra 400 kilometroj. Sude de tiu bolivia mar-aliro troviĝis Ĉilio, kiu sendependiĝis de la Hispana Regnlando en la jaro 1818. Unu el la plej gravaj ekonomiaj resursoj de Ĉilio estis la sal-rezervujoj troviĝantaj en la dezerto Atakamo, ĉi tiuj rezervujoj etendiĝis ankaŭ tra Bolivio kaj sude de Peruo. Tiu salo estis transportita pere de ĉiliaj fervojoj en la tiaman bolivian havenon de Antofagasto.



Antikva land-karto de la teritorio.
Tiam Bolivio (blu-kolore reprezentita)
posedis propran marbordon.

En la jaro 1878, la Nacia Asembleo de Bolivio aprobis imposton po 10 centavoj por ĉiu 100 kilogramoj da salo transportita, tiu pago devis esti plenumita de la ĉilia fervojista kompanio. Ĉilio protestis pro tiu imposto, laŭ traktato inter ambaŭ ŝtatoj de la jaro 1874, Bolivio akceptis ne altigi impostojn al ĉiliaj fervojoj ĝis la jaro 1899. Samtempe Ĉilio proponis diskuti pri tiu problemo kun la interveno de internacia arbitraciisto.

La bolivia registaro ne akceptis tion, ĉar tiu decido apartenis al la interna jurisdikcio de sendependa ŝtato. Kiam Bolivio minacis per konfisko de la posedaĵoj de la fervoja kompanio, la ĉilia armeo okupis la havenurbon

Antofagaston la 14-an de februaro de 1879. Tiam Bolivio deklaris militon kontraŭ Ĉilio kaj, laŭ traktato antaŭe subskribita, petis helpon al Peruo. Ĉilio deklaris militon en aprilo 1879 al Peruo kaj al Bolivio. Dum la milito Ĉilio okupis la tutan bolivian marbordon kaj ties trupoj penetris en Peruon.

En la jaro 1884 Bolivio kaj Ĉilio subskribis armisticon. Laŭ tiu akordo la marborda bolivia provinco Antofagasto restis sub ĉilia suvereneco. Tio restis same ĝis kiam en la jaro 1904 oni subskribis definitivan pac-akordon inter ambaŭ ŝtatoj. Kompense Ĉilio akceptis konstrui fervoĵan linion inter la bolivia ĉefurbo La Paz kaj la haveno de Arica. Same, Ĉilio garantiis la liberan komercan vartrafikon al Bolivio tra ĉilia teritorio kaj ankaŭ en la havenoj de la nordo de Ĉilio.



Civitanoj de la tiama bolivia urbo Calama, pretaj kombati

La perdo de mar-aliro provokis en Bolivio gravajn politikajn kaj ekonomiajn konsekvencojn, tiel, oni diris, ke tiu teritoria perdo embarasis la disvolviĝon de la lando. Aliflanke, Ĉilio malpravigis tiun aserton, laŭ la ĉiliaj registaroj, la traktato subskribita en la jaro 1904 permesis al Bolivio ĝui komercajn avantaĝojn en la nordaj ĉiliaj havenoj. Tie, la bolivianaj varoj povas eniri kaj eliri tutlibere sen dogan-impostoj, eĉ laŭ lastaj kalkuloj pli ol sep mil bolivianaj entreprenoj agadas en tiuj havenoj. Malgraŭ tiuj avantaĝoj, Bolivio ĉiam postulis rekuperi marbordan teritorion sub bolivia jurisdikcio, tamen Ĉilio neniam estis preta rezigni teritorion.

En la jaro 2015 Bolivio prezentis plendon kontraŭ Ĉilio antaŭ la Internacia Kortumo en Den Haag. Laŭ la bolivia registaro, Ĉilio estis devigata pritrakti la problemon de la bolivia mar-aliro kun Bolivio. Male, Ĉilio asertis, ke la traktato subskribita en la jaro 1904, kiu fiksas limojn inter ambaŭ ŝtatoj estis tute valida kaj plene efika. La fina juĝo de la Kortumo proklamis, ke Ĉilio

ne estas devigata atingi novan akordon kun Bolivio pri teritoriaj limoj. Malgraŭ tio, la internacia tribunalo agnoskis, ke estas konstatite ke Bolivio kaj Ĉilio havas longan historion de dialogoj, interŝanĝoj de opinioj kaj paroladoj, celantaj atingi justan solvon al tiu afero.

En ĉi ĉiuj konversacioj pri bolivia mar-aliro inter ambaŭ ŝtatoj ekzistas tria ĉefrolulo, Peruo. Oni devas memori, ke okaze de la Pacifika milito ankaŭ Peruo perdis kelkajn teritoriojn favore al Ĉilio, kvankam Peruo daŭre posedas longan marbordon, eĉ post tiu perdo. En la jaro 1929 Ĉilio kaj Peruo subskribis traktaton en la urbo Limo, en tiu dokumento oni asertas jene:

"La registaroj de Peruo kaj Ĉilio ne rajtas, sen antaŭa komuna akordo, cedi al tria ŝtato teritoriojn kiuj laŭ ĉi tiu traktato restas sub la suvereneco de unu el la ŝtatoj, ankaŭ ili ne rajtos konstrui novajn internaciajn fervojajn liniojn sen la akcepto de ambaŭ ŝtatoj en tiuj teritorioj."

Do, se Ĉilio havigas maraliron al Bolivio, tio devas esti unue akceptata de Peruo. La oficiala pozicio de Peruo rilate la aferon pri la bolivia maraliro baziĝas sur la konsidero kiel justa de la pretendo de Bolivio solvi ĉi tiun problemon. Tamen, tio ne signifas ke Peruo estas preta perdi rajtojn atingitajn en la traktato subskribita kun Ĉilio. Tiel, laŭ la akordo subskribita de ambaŭ ŝtatoj en la jaro 1929, Peruo ĝuas gravajn avantaĝojn en la ĉilia haveno de la urbo Arica kaj en la maroj de la regiono Tacna en Ĉilio.



Haveno de la urbo Arica en la nordo de Ĉilio

La plej evidenta apogo de Peruo al la boliviaj aspiradoj de maraliro okazis en la jaro 1997, tiam Peruo cedis 5-kilometran plaĝon al Bolivio en la regiono Ilo, eĉ oni alnomis tiun lokon per nova kaj tutklara nomo "Bolivia Mar". La akordon pri tiu cedo dum 99 jaroj subskribis la tiamaj prezidantoj, tiu de Peruo Alberto Fujimori kaj de Bolivio Jaime Paz Zamora. Ĉi tiu koncesio utilis por malpliigi komercajn rilatojn de Bolivio kun la havenoj de la nordo de Ĉilio. Oni celis ankaŭ, ke ebla solvo al la problemo de ne-ekzisto de bolivia maraliro, dependus de la ŝtato venkinta en milito, kiu provokis tiun situacion.



Loko kie situas la plaĝo Boliviamar, apud la perua urbo Ilo.

Kio estas Bolivia Mar?

Bolivia Mar aŭ Boliviamar estas plaĝo 5 kilometrojn laŭlonge kaj 800 metrojn larĝe, cedita kiel senpaga prunto al Bolivio fare de Peruo. Ĉi lasta ŝtato daŭre ĝuas suverenecajn rajtojn sur la teritorio. La cedo daŭros 99 jarojn, depost la jaro 1992, kvankam ĉi tiu tempo-daŭro estas plilongigebla se ekzistas akordo inter ambaŭ partioj. La teritorio troviĝas je 17 kilometroj de la perua urbo Ilo kaj je 462 k-moj de La Paz, la bolivia ĉefurbo.

Estas necese diri, ke Peruo cedis al Bolivi ĉi tiun marbordan terpecon nur por esti uzata kiel turisma centro, do, tie ekzistas nek komerca aŭ milita haveno kaj ankaŭ ne industrioj. Nuntempe la plaĝo ankoraŭ estas sovaĝa loko, kies administrado apartenas al la perua najbara urbo Ilo, ĉar Bolivio, malgraŭ la traktato subskribita, neniam prenis sur si la regadon de la teritorio.

Krom cedo de la plaĝo Bolivia Mar, la traktato subskribita en la jaro 1992 pravidis la starigon de liber-komerca haveno tuj apud la perua urbo Ilo kaj la faciligon al boliviaj entreprenoj uzi la havenajn instalaĵojn de tiu urbo. La akordo neniel signifas havigi suverenecajn rajtojn al Bolivio sur perua teritorio, ankaŭ ne konstrui laŭvole ĉe la plaĝo Boliviamar, ĉar la sola celo de tiu plaĝo estas konstrui turismajn rezidejojn.



Bolivia grupo ĉe Boliviamar. Tie la sola konstruaĵo estas fera monumento

Kvankam la akordo estis subskribita oficiale de la prezidentoj de Peruo kaj Bolivio, fine ĉi lasta nek okupis nek investis en la perua plaĝo. La boliviaj aŭtoritatuloj konsideris, ke la cedo de tiu malgranda marbordo povus pravigi la ĉilian tezon rilate la ne-diskutadon kun Bolivio por trovi eblan maraliron. Tiel, se Bolivio jam disponis pri marborda teritorio jam ne estus necesaj novaj ĉiliaj koncesioj en ties havenoj. Tiel, nuntempe ĉiuj varoj ankoraŭ eniras en Bolivion pere de la ĉiliaj havenoj Arica kaj Iquique.

Alia afero kiu malebligas okupon de Boliviamar estas ekzistanta kruta monto apud la plaĝo, do, estus necesaj grandaj investoj por konstrui taŭgajn komunik-liniojn inter la cedita plaĝo kaj la ĉirkaŭanta perua teritorio. Verdire Bolivio ne konstruis ilin, ĉar tiuj monaj rimedoj estis pli necesaj aliloke, ne por konstrui aŭto-ŝoseon al turisma centro.

La akordo de la jaro 1992 pliboniĝis en 2010, tiam la perua prezidento Alan García kaj la bolivia Evo Morales suksribis novan akordon laŭ kiu Peruo disponigis favore al Bolivio grandan parton de la haveno de la urbo Ilo dum 50 jaroj. Tiu nova interkonsento antaŭvidis la albordegon de grandaj ŝipoj, eĉ oni akceptis fare de Peruo la alveno de boliviaj milit-ŝipoj. Tamen ree, ĉi tiu interkonsento ne realiĝis, ĉar la boliviaj deziroj estas disponi pri propra teritorio en la nuntempe nordo de Ĉilio.

Hodiaŭ Bolivia Mar estas tute forlasita plaĝo, tie nur agadas peruaj fiŝkaptistoj de la apuda urbo Ilo, kvankam de tempo al tempo turism-agentejoj akompanas boliviajn turistojn kiuj deziras koni la solan plaĝon sub bolivia administrado, tamen ĉi tiu regado nur ekzistas el teoria vidpunkto.



Boliviaj deziroj disponi pri propra maraliro estas tiel fortaj, ke oni kreis flagon nur por diskonigi tiun aspiron.



JURA SEMAJNO estas ĉiusemajna informilo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Eldonita kiel malgranda bulteno, ĝi aperas kaj estas dissendata nur rete. En JURA SEMAJNO estas eble legi pri ĵusa jura afero. Ene de la sekcio "Vortaro" oni povas lerni pri ĵura vorto, ekzemploj, sinonimoj, taŭga uzo ktp.

JURA SEMAJNO estas informilo tute malfermita al juristoj scipovantaj la internacian lingvon.

Jura rilato inter la Kanada ŝtato kaj ĝiaj aborigenaj popoloj. La starigo de Nunavuto.

Tuj post la konkero, fare de la brita armeo, de la teritorioj antaŭe francaj kolonioj en Kanado, la brita reĝo Georgo la 3-a aprobis en la jaro 1763 Proklamon, laŭ kiu, oni agnoskis al indiĝenoj la okupadon kaj ekspluatadon de vasta teritorio inter la eksaj francaj kolonioj kaj la rivero Hudsono. Laŭ tiu proklamo, estis tute malpermesata la vendo aŭ donaco al eŭropaj koloniantoj de la teroj kie loĝis la kanadaj aborigenoj. Ĉi tiuj teroj nur povus esti venditaj al brita krono, samtempe la brita reĝo proklamis sin kiel altan protektanton de la rajtoj de la kanadaj indiĝenoj. Ĉi tiu dokumento, la Reĝa Proklamo de la jaro 1763, estas agnoskata kiel leĝa regularo antaŭa al la fondiĝo de la kanada brita kolonio mem. Ĝi estis ankaŭ la deir-punkto de postaj traktatoj subskribitaj dum la 19-a kaj eĉ dum la 20-a jarcentoj.



Proklamo de la Reĝo Georgo la 3-a de la jaro 1763

La unua konstitucia teksto de Kanado, aprobita en la jaro 1867, agnoskis en sia artikolo 91-la devon de la federala kanada registaro prizorgi la rajtojn de la indiĝenoj, tamen tiuj rajtoj nenie kaj neniam estis klare difinitaj kaj temis nur pri iaspeca deklaro, sen praktikaj rezultoj aŭ konkretigoj. Eble pro tio, ĝis la jaro 1973, la Supera Kortumo de Kanado ne akceptis tiujn specialajn rajtojn de la kanadaj indiĝenoj. Verdire, la Reĝa Proklamo parolis pri rajtoj de la aborigenoj rilate iliajn teritoriojn, tamen el la praktika vid-punkto, tiuj rajtoj ne realiĝis, pro tio la Supera Kortumo konsideris, ke ĉiuj kanadanoj estis egalaj, ankaŭ la aborigenoj, kiuj ĝuis samajn rajtojn ol la aliaj civitanoj.

Tamen en la jaro 1973, okaze de la afero “*Calder*” (Kalder), la Supera Kortumo pritraktis la ekziston de tiuj rajtoj. En la jaro 1967 Frank Calder kaj aliaj maljunaj anoj de la Nisgaa popolo plendis kontraŭ la registaro de la provinco Brita Kolumbio. Ili konsideris ke ilia proprieto de la teroj kie tradicie kaj historie sidejis la Nisgaa popolo neniam ĉesis post la aprobo de la Reĝa Proklamo. En la unuaj instancoj la tribunaloj rifuzis la plendon, tamen fine la Supera Kortumo akceptis, ke kiu ajn peto de la indiĝenoj rilate la proprieton de teritorioj devis esti akceptata, se tiu postulo baziĝis sur pravaj faktoj el la perspektivo de la tiama Reĝa Proklamo.

Depost tiu grava juĝo kaj okaze de postaj konstituciaj reformoj, oni klopodis efektive prizorgi tiujn rajtojn, tamen oni atingis neniun konkretan rezulton. Pro tio la afero pri la historia proprieto de la indiĝenaj teritorioj neniam estas definitive solvita, tiel, kvankam oni agnoskis la rajtojn de la indiĝenoj loĝi, tio estas okupi kaj profiti, iliajn tradiciajn teritoriojn, neniam oni decidis kiu popolo proprietis konkretajn teritoriojn.



Frank Calder, estro de la domo de Wisinxbiltkw, de la tribo Killerwhale en Kanado.

En la jaro 1987 oni kunvokis reĝan komitaton pri aborigenaj popoloj. La decidoj de tiu komitato estis gravaj kaj interesaj, ĉefe ĉar ili klopodis solvi konkretajn aferojn, inter ili:

- 1) Difini kiujn specifajn rajtojn ĝuas la indiĝenoj en Kanado.
- 2) Kiamaniere, el la administracia vidpunkto, la indiĝenaj popoloj povus regi sin mem.
- 3) Por helpi la disvolviĝon de tiuj popoloj oni proponis la starigon de speciala fondaĵo kun pli ol 1.500.000 kanadaj dolaroj.
- 4) Nuligi la prizorgadon de la kanadaj indiĝenoj fare de la federala registaro.

Bedaŭrinde la kanada registaro ne akceptis tiujn proponojn, male ĝi preferis redakti alternativan dokumenton, kiu verdire solvis neniun problemon. Tamen, el tiu unua malsukceso gravan atingon rezultis. Unuafoje oni diskutis pri kiamaniere la indiĝenaj popoloj devus regi kaj administri sin mem. Oni proponis tiam la starigon de nova administracio en Kanado, apud la jam ekzistantaj federala kaj provincaj registaroj, oni menciis la eblon koncedi aŭtonomecon al la indiĝenaj popoloj.

Verdire temas pri tre interesa solvo, ĉar ĉi tiel, ebla aŭtonoma aborigena registaro en Kanado povus solvi la problemojn de la proprieto de la teritorioj kaj de la ekspluatado de la naturaj resursoj tie ekzistantaj. Tiel ĉiu aborigena popolo povus administri sian propran teritorion, kaj sendube tiu estus taŭga kaj definitiva solvo al la problemo de la teritoria proprieteco en Kanado. Do, la agnosko de aŭtonoma povo al la indiĝenoj, malsimila al tiu de la provincoj kaj de la federala ŝtato, estis taŭga deir-punkto.



Situo de la nova kanada teritorio Nunavuto

Tamen, alia problemo aperis: ne ĉiuj aborigenaj popoloj konsentas pri la konkretaj teritorioj kiujn ili celas proprieti. Tiel, la sola indiĝena popolo kiu ĝis nun starigis tiun aŭtonoma administradon estis la inuita etno. En la jaro 1999 nova teritorio oficiale fondiĝis en Kanado kun la nomo NUNAVUT. Nunavut en la inuita lingvo signifas NIA TERO, kaj temas pri nova teritorio en Kanado.

Kiu diferenco ekzistas inter provinco kaj teritorio en Kanado? Nu, ĉiuj “teritorioj” en Kanado troviĝas en la nordaj regionoj de la ŝtato. Alie, la provincoj havas malpli da influoj de la federala registaro, kontraŭe la rolo de la tutnacia registaro estas pli grava en la teritorioj. Nunavut troviĝas en la nordpolusaj regionoj de Kanado, kaj temas pri la hejmo de la popolo inuito, antaŭe konataj kiel eskimoj, kvankam oni preferas ne uzi la vorton “eskimon” por preparoli ĉi tiun etnon, pro la malestima signifo, kiun tiu vorto havas por la inuitoj. Eskimo signifas “tiu kiu mangŝas krudajn fiŝojn”, dum la vorto inuito signifas “homo”.

Estas necese diri, ke ĉi tiuj nordpolusaj teritorioj ne estis origine la sola hejmo de la inuitoj. Ili okupis de tempo al tempo tiujn teritoriojn en la pasinteco por ĉasi kaj fiŝkapti. Tamen, en la komenco de la Dudeka Jarcento, la kanada federala registaro devigis ilin resti konstante en tiuj teritorioj. Kial? Nu, ne ĉiuj nacioj en la mondo aĉceptis la kanadan suverenecon super tiuj teritorioj, do, Kanado bezonis konstantan ĉeeston de kanadaj civitanoj en tiuj teritorioj por pravigi tiun suverenecon. Pro tio, ekde la dudekaj jaroj en la pasinta jarcento la nordpolusaj teritorioj de Kanado estis la natura kaj konstanta hejmo de la inuitoj, kiuj post tiuj jaroj jam ne okupis aliajn teritoriojn.



Ikaluito, ĉefurbo de la teritorio Nunavuto

En la sepdekaj jaroj kelkaj min-kompanioj komencis priesplori la teritorion kun la celo eltiri mineralojn. Inuitoj tiam ekkomprenis, ke tiu ekspluatado de la teritorio ne povus okazi sen la efektiva kontrolo de la tiea enloĝantaro. Okazis tiam la unua postulo de la inuita etno por regi sian propran teritorion kaj atingi aŭtonoman povon.

La kanada federala registaro ne aĉceptis en tiu momento la postulon de la inuita loĝantaro, ĉar temus pri registaro bazita nur sur etnaj kriterioj, tiel temus pri registaro de kaj por inuitoj. Feliĉe la afero ŝanĝiĝis kiam la Reĝa Komitato pri Indiĝenaj Popoloj proponis la starigon de tiuj propraj registaroj por helpi la disvolviĝon de la aborigenoj en Kanado. Sendube, inuitoj sciis profiti la okazon por peti tiun aŭtonomecon.

La reprezentantoj de la inuita popolo prezentis projekton al la kanada registaro por difini kiujn temojn estus nepre diskutendaj, inter ili:

- Kiun edukadon devus ricevi la infanoj en la inuitaj lernejoj. Kaj tio ne temis nur pri la uzinda lingvo en la lernejoj, sed ĉefe pri la kulturo diskonigenda

al infanoj en la inuita teritorio. Kompreneble, la inuitaj reprezentantoj deziris diskonigi sian kulturon kaj ne nur tiun ĝeneralan de la cetera Kanado.

- Alia temo pridiskutinda estis difini ĝuste la rajtojn de la inuitoj ĉasi kaj fiŝkapti ĉar tiu estis la ĉefa viv-rimedo de tiu popolo dum jarcentoj. Rilate ĉi tiun temon, neniuebla estonta decido de la federala kanada registaro povus esti akceptita, ĉar temas pri aferoj ekskluzive regulotaj de la aŭtonoma inuita registaro.

En la jaro 1990 la konversacioj inter la inuitaj reprezentantoj kaj la kanada registaro finiĝis sukcese. Tamen, tiam, aperis nova grava afero. Ĉu inuitoj rajtis efektiviĝi eblan rajton de memdetermino? Dum la konversacioj ĉi tiu afero ne estis kaŝita de la inuitaj reprezentantoj, tamen ankaŭ ne temis pri afero eksplicite metita sur la tablo dum la diskutoj.

La reprezentantoj de la kanada registaro sciigis tutklare sian pozicion: la nova teritorio ĝuis iaspecajn suverenajn rajtojn por aprobi aferojn rilate al la aborigenaj kulturo, lingvo, edukado kaj viv-stilo, tamen ĉi ĉio neniel signifus, ke tiu nova teritorio povus esti iam sendependa ŝtato en Nordameriko. Inuitaj reprezentantoj tion akceptis. Ĉiumanere estis malfacile pripensi novan ŝtaton en tiel vasta teritorio kun nur 50.000 enloĝantoj, ĉar tiu estas la nombro da homoj kiuj loĝas en Nunavut.

La akordo subskribita de ambaŭ partioj agnoskis la proprieton favore al la inuita popolo de la teroj kaj akvoj de la orienta Arkta Oceano, tie ili havas senlimajn rajtojn pri tradiciaj aferoj kiel ĉasado, fiŝkaptado kaj terkulturado. La inuita popolo ankaŭ ricevis garantiojn pri la demografia proporcio de la teritorio, kie inuitoj ĉiam estos la plej nombra plejmulto.



En la jaro 2002 la reĝino Elizabeto la 2-a, ankaŭ ŝtatestro de Kanado, vizitis la teritorion Nunavuto.

Ĉu ĉi tiu akordo estus realigebla en aliaj partoj de Kanado rilate aliajn indiĝenajn popolojn? Nu, estas necese memori, ke Nunavut troviĝas en tre speciala teritorio, ĉar en la nordpolusaj regionoj la eŭropa enmigrado de koloniantoj ne okazis, ĉefe pro la malfavoraj vivkondiĉoj de tiuj zonoj. Tiu teritorio nur interesis al ceteraj kanadanoj kiam oni eltrovis min-resursojn. Do, estis facile starigi teritorion el la administracia vid-punkto, tie kie la inuita enloĝantaro estis la solaj enloĝantoj.

Pri la ceteraj tridek indiĝenaj etnoj ekzistantaj en Kanado la solvo estus malfacile ripetebla, pro la fakto ke multaj el tiuj popoloj kverelas inter si pro la proprieto de konkretaj teritorioj, kaj la plimulto el ili troviĝas en regionoj dense loĝataj ankaŭ de ne-indiĝenaj kanadanoj. Kiel kuriozaĵo oni devas diri, ke la proprieto de la teritorio kie kaŝas la urbo Vankuvero estas diskutata de kelkaj indiĝenaj popoloj, krome tie loĝas preskaŭ unu miliono da homoj kiuj sendube ankaŭ rajtus opinii pri la afero.



Kanado, regionoj kaj teritorioj.

Tamen, la starigo de novaj teritorioj regataj de aborigenaj popoloj, kun respekto al la tradicia kulturo kaj viv-stiloj, estus bonega unua solvo, kaj ĉi tiu modelo ne nur estus realigebla en Kanado sed ankaŭ en aliaj amerikaj ŝtatoj kiuj ankaŭ pridiskutas la rolon ludotan de la indiĝenoj en la politika vivo, ekzemple en Brazilo aŭ en la meksika ŝtato Chiapas.

Resume, Kanado ankoraŭ ne solvis definitive siajn problemojn rilate la agnoskon de la rajtoj de la indiĝenaj popoloj. Tamen ĉi tiu afero neniam estis forgesita de la juraj instancoj de la ŝtato, nek de la registaro mem.

Grava detalo estas la fakto, ke la konstitucia reformo preferis adopti novan uzeblan nomon por tiuj etnoj, kiuj ekde tiam estas nomitaj kiel “originaj nacioj de Kanado”, sendube elstara kvalifiko kiu montras, ke ili okupis la teritoriojn antaŭ la alveno de la eŭropaj koloniantoj. En ĉi tiu momento ni devas memori la malnovan latinan sentencon “*Prior in tempore potior in iure*” (la unua en la tempo ĝuas pli fortajn jurojn” (eĉ pli ampleksajn jurojn, ni povus aldoni).

Sed la solvo proponita de la kanada registaro ne povas esti la sama por ĉiuj originaj nacioj, ĉar ne ekzistas du popoloj similaj. En la kazo de la inuita etno ili okupis tre konkretan kaj malfavoran lokon por vivi, do pliaj solvoj devas esti trovataj en aliaj lokoj. Feliĉe la diskutoj inter la kanada registaro kaj la originaj nacioj daŭriĝas kaj se la definitiva solvo estos malfacile atingebla, sendube konkretaj aferoj rilate propretecon, viv-stilojn kaj edukadon povos esti atingotaj.



Kunlaboru kun

JURA TRIBUNO INTERNACIA

Se vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj. Vi nur devas atenti pri la jenaj kondiĉoj:

ARTIKOLOJ: rilataj al iu jura branĉo. Do: krimpuna, ekonomia, imposta, civila, internacia, historia, filozofia, administracia ktp. Pri la longeco, pli malpli 4/10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca).

RECENZOJ: vi povas recenzi verkon. La libro elektota devas temi pri Juro, kvankam ne necese pri/en esperanto. La libro povas esti redaktata en kiu ajn lingvo, tamen la recenzon oni devas verki en esperanto.

INFORMOJ: oni povas informi pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj, ktp, aŭ pri io rilata al la Juro en via lando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi 1/3 foliojn.

Juraj Informoj

- **Repago de trajna bileto pro prokrasto ĉiam eblas, eĉ se tio okazis pro neeviteblaj cirkonstancoj, laŭ la Eŭrop-unia Kortumo.**

Laŭ la juĝo eldirita en la afero C-509/11 ÖBB-Personenverkehr AGEJ, la Eŭrop-unia Kortumo decidis, ke vojaĝantoj rajtas ricevi partan repagon de la kosto de la bileto, kiam okazis grava prokrasto en la fervoja servo, eĉ kiam tio ŝuldiĝis al neeviteblaj cirkonstancoj. La repago devas esti minimume de la 25% de la kosto de la bileto, kiam la servo prokrastiĝis inter 60 kaj 119 minutoj, kaj de 50% se temis pri pli ol 120 minutoj.

La Reglamento 1317/2017, de la Eŭropunia Parlamento kaj de la Konsilio, de la 23-a de oktobro de 2007, pri rajtoj kaj devoj de la uzantoj de fervojaj servoj, akceptas nenian escepton al la rajto ricevi kompenson kaze de prokrasto, eĉ se tio ŝuldiĝas al neeviteblaj cirkonstancoj, laŭ la Kortumo klarigis. Ĉi tiu repago temas pri mona kompenco kalkulita laŭ normigitaj kriterioj, do tio tute malsimilas al eblaj reparacioj ŝulditaj pro damaĝoj okazigitaj al konkreta individuo.

Do, laŭ la Eŭropunia Kortumo, la fervojaj kompanioj ne povas enmeti ene de la ĝeneralaj kondiĉoj de la kontrakto subskribita kun vojaĝantoj, klaŭzon kiu malŝarĝas la kompanion de la devo repagi la bileton se okazas prokrasto.



- Verkistino kondamnita pro murdo de ŝi rakontita.

Nancy Crampton Brophy, 71-jaraĝa verkistino, estas kondamnita je dumviva enkarcerigo pro la murdo de sia edzo en la jaro 2018. S-ino Crampton verkis en sia blogo ĉapitron sub la titolo "Kiel murdigi edzon". Tie, ŝi pritraktis kiujn armilojn uzi, se oni deziras murdigi sian edzon. Daniel Brophy, edzo de la verkistino, estis murdigita en la jaro 2018 kaj, tuj post legi la blogon, prokuroro akuzis ŝin.

Polico esploris kaj oni eltrovis, ke video-kamerao registris ŝin ĝuste en la loko kie okazis la murdo. Same, oni sciis, ke ŝi aĉetis armilon, kiu povus esti uzita por murdi S-ron Brophy, kvankam tiu armilo poste ne aperis. Kiel defendo ŝi asertis, ke tiu aĉetita armilo utilis al ŝi por skribi la tekston, ĉar ŝi ne sciis kiel armilo funkciis. Same, asekuro estis kontraktita de ŝi kontraŭ forpaso de sia edzo, tio mem ankaŭ aperis sur la teksto.

En sia blogo la verkistino rekomendas ne uzi sikarion por murdi iun, ĉar ne temas pri fidinda solvo. Same, ŝi asertis, ke la uzado de venenoj ne estas efika, ĉar ili estas facile eltroveblaj post analizo. Pli bone, ŝi skribis, se oni uzas armilojn, kvankam ili estas bruegaj. Fine, ŝi verkis, ke por ŝia edzo kaj por ŝi mem, tiu estis ilia dua, kaj tutcerte lasta, geedza rilato, kiu neniam finiĝus per divorco, kvankam estus eble fini ĝin per pafado.



Nancy Crampton Brophy kaj la kovrilo de unu el ŝiaj libroj

- **Plendo kontraŭ disko-kovrilo pro ebla infana pornografio malfruiĝis.**

Juĝisto en la usona ŝtato Kalifornio malakceptis postulon de S-ro Spencer Eldern. Li akuzis eksajn membrojn de la muzik-ensemblo *Nirvana* kaj la fotografiiston Kirk Weddel pri infana pornografio. Spencer Eldern, kiu nuntempe estas 31-jaraĝa, estis la bebo aperanta sur la kovrilo de la disko *Nevermind*, de la ensemblo *Nirvana* en la jaro 1991. Sur tiu fotografaĵo li aperas tute nuda, dum li naĝas celanta kapti dolar-bileton. La plendo baziĝas sur la fakto, ke li neniam permesis al disko-produktistoj uzi bildon, kie li aperas tute nuda kaj pro tio li petas mon-komponson de 150.000 usonaj dolaroj.

Laŭ la junulo, li suferis dum sia tuta vivo angoron kaj tio damaĝis lian ĉiutagan vivon, li eĉ bezonis kuracistan kaj psikologian helpon. La juĝo proklamas, ke tiu ebla delikto preskriptiĝas en Kalifornio post 10 jaroj kaj nun jam pasis eĉ multe pli da tempo, do li ne povas prezenti plendon kontraŭ tiu akto.

En la jaro 1991 gepatroj de Stephen ricevis 200 usonajn dolarojn kontraŭ la fotografaĵo, poste la muzik-ensemblo *Nirvana* vendis pli ol 30 milionojn da ekzempleroj de la disko. La advokatoj de la juna Stephen apelacios kontraŭ tiu juĝo.

Kovrilo de la disko *Nevermind* de la jaro 1991





**Kio estas la Internacia Jurista
Esperanto-Asocio ?**



Jura Tribuno Internacia
Oficiala organo de IJEA



Juraj Universalaj Tekstoj

Ĉi tie vi trovos la tradukon en Esperanton de gravaj internaciaj juraj tekstoj.

www.esperanto.org



Libroj eldonitaj

Inter la celoj de IEAJ troviĝas la publikigo en Esperanto de verkoj rilataj al juro.



Statuto de IJEA

Valida ekde la aprobo de la asemblea kunsido de 24.07.2016 okazigita en Nitro (Slovakio)



Vortaro

Jura Terminologio



Kursoj

- Kurso pri Internacia Mar-Juro



Nia celaro

Jen la celoj de Internacia Jurista Esperanto-Asocio.

antojuero.org



Fariĝu membro de IJEA !

Se vi laboras aŭ rilatas al juraj medioj, ne hezitu: vi povas ĉef-roligi en IJEA.



Estraro de IJEA



Robotoj, rajtoj kaj devoj. La vojo al elektronika personeco.

En la jaro 1950 Isaac Asimov¹ verkis la libron "*I, Robot*"². En ĉi tiu verkaĵo robotoj aperas ĉefe kiel iloj kun artefarita cerbo, dezajnitaj por plibonigi la vivon de homoj, tio estas, ne temas pri danĝeraj inventoj similaj al Frankenŝtejno. La robotoj de Asimov estas kondiĉigitaj de la tiel nomataj "tri robotleĝoj", laŭ kiuj:

- 1) Roboto ne povas malutili al homo aŭ, per neagado, permesi ke homo difektiĝu.
- 2) Roboto devas obei ordonon donitaj al ĝi de homo, krom se la ordono kontraŭdiras la Unuan Leĝon.
- 3) Roboto devas gardi sian ekzistecon, krom se tio kontraŭas la Unuan aŭ Duan Leĝojn.

Tiel, almenaŭ en fikcia romano, la interna ideo de robotoj estas la nepra kaj absoluta subordigo al la homa kontrolo, temas pri la principo nomita "*Human in Command*" (sub homa komando). Ĉi tiu formulado enkadriĝas en la literatura mondo, nuntempe robotoj (ankoraŭ) ne estas tute similaj al tiuj pripensitaj de Asimov. Tamen, robotoj jam ekzistas kaj dank'al ili oni komencas paroli pri "artefarita intelekto". Do, jura scienco en nia nuntempa mondo devus pristudi eblan reguligon de la agadoj plenumotaj de robotoj.

Eŭropunia Parlamento, ene de rezolucio de la 16-a de februaro de 2017 jam sciigis siajn rekomendojn al la Eŭropunia Komisiono pri robotoj en la civila juro de la ŝtato-membroj. Unue, tiu rezolucio precize klarigis kion devas havi ĉiu roboto por esti tiel konsiderata.

1. Isaac Asimov, 1919-1992, rus-devena usona verkisto pri sciencfikcio.

2. Esperantigita "Mi, Roboto". Temas pri libro de Isaac Asimovo, unue publikigita en la jaro 1950. La libro enhavas kolekton de 9 noveloj, ligitaj en unu kadrarakonto.

- 1) Roboto devas esti memstara.
- 2) Roboto kapablas memlerni.
- 3) Roboto havas eblon adapti sian konduton.
- 4) Roboto devas posedi fizikan bazon kie vivo absolute forestas.



Pro ĉi tiuj kvalitoj, robotoj diferencas de aliaj maŝinoj pli *inteligentaj* ol homoj. Ekzemple, ekzistas aparatoj kiuj estas kapablaj venki ĉiam al homoj okaze de ŝakludo, tamen verdire ili ne estas robotoj, ĉar ili nur povas apliki sian programaron en konkreta afero, ŝakludo, tamen ili ne povas sin dediĉi al aliaj taskoj. Do, vera roboto lernas lerni kaj tio helpas al li atingi memstarecon en sia agado.

Ĉu estas eble asigni personecon al roboto?

Inter la rekomendoj de la Eŭropunia Parlamento troviĝas tiu, laŭ kiu estus necese pristudi, eĉ se longa-tempe, la havigon al memstaraj robotoj de iaspeca jura personeco. Tio estas, tiuj maŝinoj pli kompleksaj kiuj kapablas preni inteligentajn decidojn kaj havas iamaniere rilatojn kun homoj, povus atingi juran personecon, aŭ pli bone dirite, elektronikan personecon. Estas necese averti, ke se tiuj robotoj povas preni proprajn decidojn, ili ankaŭ povus kaŭzi damaĝojn. Ĉi tiu situacio estus tute simila al la agadoj plenumitaj de bestoj, ĉi tiuj estas vivantaj estaĵoj kiuj ankaŭ povas okazigi damaĝojn. En la kazo de la bestoj, respondeco apartenas al la mastro, se temas pri sovaĝa besto ĝenerale la damaĝoj kaŭzitaj estas kompensitaj de asekur-kompanio aŭ de la administracio. Do, almenaŭ nuntempe ne estus necese asigni personecon, ĉu jura ĉu laŭ ebla nova koncepto de "elektronika" personeco, se fine mastrumantoj aŭ fabrikantoj respondeciĝas pri eblaj damaĝoj kaŭzitaj de roboto misfunkcianta.

Kvankam alia ebla solvo estus asigni personecon al robotoj tute simila al tiu de la juraj personoj, ĉar nuntempe entreprenoj aŭ komercoj respondecas eĉ laŭ pun-jura vidpunkto.

Ĉu robotoj povus ĝui rajtojn?

Memstaraj robotoj kun artefarita intelekto kapablas krei artaĵojn, tiel pentraĵojn³ kaj muzikaĵojn⁴. Do, ĉu roboto povus ĝui aŭtorajn rajtojn rilate al tiuj verkoj de li kreitaj? Eŭropunia Parlamento jam pritraktis ĉi tiun temon okaze de Rezolucio de la 20-a de oktobro 2021. Oni distingas en tiu rezolucio inter aŭtoraj rajtoj sur kreaĵoj en kiuj kunlaboris artefarita intelekto kaj tiuj verkoj kies kreanto estis nur artefarita intelekto⁵.



Pentraĵo realigita de roboto kadre de la projekto *The Next Rembrandt*.

3 En la jaro 2019, kadre de la projekto "The Next Rembrandt" (La proksima Rembrandt), grupo de sciencistoj kaj muzeoj de Nederlando prezentis portreton pentritan de komputilo laŭ simila stilo al pentraĵoj de Rembrandt. Verdire ne temis pri memstara verko, por la fakto ke oni havigis al la komputilo bildojn de ĉiuj pentraĵoj de la nederlanda pentristo, poste oni ordonis al ĝi krei bildon laŭ tiu sama stilo.

4 En la jaro 2019 la entrepreno Amazon ekigis la disvendadon de *DeepComponser*. Temas pri klavaro, kiu konektita kun la "nubo" lernas kaj komponas proprajn melodiojn. Nubo estas komputadaj infrastrukturoj kiuj konsistas el servoj liverataj per komunaj centroj kaj konstruata en serviloj.

5 En la jaro 2016 okazis la premiero de sciencfikcia filmo "SunSpring". La scenaro de ĉi tiu mallongdaŭra filmo estis verkita ekskluzive de artefarita intelekto. La programistoj de la komputilo surpriziĝis pro la fakto, ke la maŝino mem verkis tekston por la son-bendo de la filmo, kvankam programistoj neniam ordonis al la komputilo fari tion. Laŭ ili poste eltrovis, verŝajne la artefarita intelekto *logike rezonis* ke ĉiuj filmoj kiujn ĝi spektis, prezentigis ne nur scenaron sed ankaŭ propran son-bendon.

Se temas pri la unua opcio, tio estas kreaĵo farita de homo sed helpita de artefarita intelekto, ĉi-kaze kompreneble aŭtoraj rajtoj apartenas al la kreanto, ĉar ebla roboto nur havigis sian helpon. Se temas pri ekskluziva kreaĵo fare de artefarita intelekto la rezolucio de Eŭropunia Parlamento distingas ĉu la verko estas vere originala aŭ nur bazita sur informoj havigitaj al ĝi de verkoj kreitaj de homoj.

Tiel, en la kazo de la projekto "*The Next Rembrandt*", la rezulto estis pentraĵo antaŭe ne-ekzistanta, tamen ĉiujn elementojn aperantajn sur la pentraĵo, tio estas okuloj de la figuro, buŝo, vestaĵo, ĉapelo ktp, estas eble eltrovi sur aliaj verkoj de Rembrandt. Do, la artefarita intelekto nur kombinis tiujn ekzistantaj elementoj sur alia nova pentraĵo. Tiel, oni povus aserti, ke se temas pri kunfandiĝo de partoj de aliaj verkoj verdire artefarita intelekto ne povas ĝui aŭtorajn rajtojn, ĉar ĝi nur kopiis jam ekzistantajn verkojn.



Sophia, la unua roboto-civitano en la mondo, agnoskita de de Saŭd-Arabio en la jaro 2017.

Estas tute malsimila afero kiam la kreaĵo estis originale elpensita de artefarita intelekto, sen influo de aliaj ekzistantaj kreaĵoj, ekz. muziko kreita de komputilo. En ĉi tiu kazo, kaj pro la fakto ke ankoraŭ ne ekzistas robota personeco, la rajtoj de tiuj verkoj apartenus al la kreanto de la programo kiu kapablis krei tiun verkaĵon.

Tamen, ĉi tiu situacio povos ŝanĝiĝi se, post sufiĉe da tempo leĝoj koncedas tiun robotan aŭ elektronikan personecon al artefaritaj intelektoj. Ĉi tio povas ŝajni absurdaĵo nuntempe, tamen informadiko kaj robotiko kuras tre

rapide, tiel Bill Gates proponis antaŭ kelke da tempo, ke robotoj devus kotizi, kiel aliaj laboristoj, ene de la sistemo pri sociala asekuro en ĉiuj landoj. Ĉi tio verdire ne estus strangaĵo, se ni scias, ke laŭ kalkuloj post kelkaj jaroj 21% el la nuntempa laboristoj estos antaŭigitaj de robotoj estontece. Kompreneble la sistemo pri sociala asekuro ne povas perdi 21% el siaj kotizantoj, do solvo povus esti, ke entreprenoj pagus kotizojn de tiuj robotoj kiel tiuj de la laboristaro. Se tio okazas, tiam robotoj jam estus kvazaŭ personoj kun devoj kaj rajtoj.

Ĉu vi konas jenan revuon?



VENTO

*estas la sola revuo en Esperantio kiu pritraktas
veksilologiajn temojn.*

La revuo estas libere alirebla ĉe: www.esperanto.ac/vento

Ni bonvenigas novan sekcion en nia revuo, temas pri "Jura Novelo". Sur ĝi, ni aperigos mallongajn verkojn pritraktantaj fikciajn kazojn aŭ juraj situacioj, kun la espero kapti la atenton, ofte rideton, de niaj legantoj. Kompreneble ni invitas ĉiujn verkemajn juristojn kunlabori kun ĉi tiu sekcio. ➡

La kazo de la malklera tatuisto



Lukas Toczki

Siletu! Silentu! -La juĝisto ekkriis kaj li, samtempe, marteladis brue sur la tablon.

Se la ĉeestantoj ne respektas ĉi tiun tribunalon, mi devige forpelos ĉiujn el la salono. -Li minacis. Pedelo! Estu atenta kaj notu la nomojn de tiuj, kiuj denove krios.

La juĝisto metis siajn manojn sur sian frunton. Espereble, ĉi-matene okazus rapida kaj simpla proceso, tamen la juĝota kazo komplikis sian laboron. Terura kapdoloro aperis.

- Nu, akuzito, sciigu al mi trankvile kaj tut-detale kial vi pugno-batis la tatuiston. Ĉu vi scias, ke via bato rompis kelkajn el liajn dentojn? -la juĝisto demandis kolereme.

- Jes, tion mi scias, sinjoro juĝisto -akceptis la akuzito -tamen, mi opinias, ke li meritis tiun punon kaj mi nun klarigos al vi la kialon. La akuzito daŭre parolis.

- Antaŭ kelkaj monatoj mi ekrlatis kun fremda knabino. Ŝi studas ĉi tie nian lingvon. En la komenco ni promenadis nur sabate vespere, sed post kelkaj semajnoj, ni parolis ĉiutage per *Whatsapp*. Ŝi ŝatis babili en nia lingvo, krome ŝi parolas perfekte la anglan kaj esperanton.

- Ho! Ĉu vere?- demandis la juĝisto - Ĉu ankoraŭ ekzistas tiu lingvo?

- Jes ja! Pli ol unu miliono da homoj parolas ĝin en la tuta mondo. Temas pri tre simpla kaj facila lingvo, se tio interesas al via moŝto, mi povas havigi al vi libron- respondis rapide la akuzito kvazaŭ komisiisto.

- Ne, ne! Ne estas necese diskonigi ĝin ĉi tie, daŭrigu vian rakontadon pri tio kio okazis- vige respondis la juĝisto.

- Antaŭ kelkaj tagoj mia koramikino petis al mi plenumi am-pruvon - li diris - Ŝi bezonis scii, ke mi amas ŝin ĝis-oste kaj por ĉiam.

- Do, vi donacis al ŝi ringon, ĉu ne? - demandis la juĝisto.

- Ho, tute ne! Ringoj povas esti perditaj -klarigis la akuzito -Mi deziris ion eternan kaj post kelkaj sekundoj mi trovis solvon. Tatuoj daŭras la tutan vivon. Do, mi kontaktis kun tatuisto, la plej bona laboranta en la urbo, oni diris al mi. Mi rakontis al li miajn dezirojn. Unue desegni jino-jangan simbolon, kiu reprezentas la eternan unuiĝon kaj mi ankaŭ deziris aperigi simplan frazon por montri mian amon. Ĉar mia koramikino parolas esperanton mi proponis al tatuisto kelkajn frazojn, sed li certigis al mi, ke li povus serĉi simplan sed belan frazon en esperanto en interreto.

- Ĉu li trovis tian frazon? - demandis la juĝisto.

- Vidu, vidu vi mem tion kion li trovis! - ĝuste tiam la akuzito refaldis siajn manikojn ĝis la kubuto, tiam aperis antaŭ jino-janga simbolo simpla frazo:

“Mi amas vi”



-Via moŝto, ĉu vi vidas ĝin? Ĉu vi povas legi ĝin? - angore demandis la akuzito.

- Jes, mi vidas la tatuajon. Kion signifas tiu frazo? - demandis la juĝisto.

- Jen la afero, sinjoro juĝisto. Ĉi tiu frazo signifas nenion! - La akuzito ekploris senkonsole.

- Kiam mi montris mian nudan brakon al mia koramikino ŝi ekploris -diris la akuzito inter larmoj.- Unuamomente mi pensis, ke tio ŝuldiĝis al emocio kaj plenĝojo. Tamen ne, ŝi ploris pro malfeliĉo. Ŝi diris al mi, ke “mi amas vi”

signifas nenion.

- Mi komprenas tute nenion - la juĝisto susuris, dum la kapdoloro pliakutiĝis. - Kaj pro tio vi pugno-batis poste al la tatuisto?



- Jes sinjoro - respondis la akuzito. - Kiam mia koramikino legis la tutaĵon, ŝi rifuzis min. Ŝi demandis al mi, ĉu mi estis tute certa pri mia amo al ŝi. Kompreneble mi kap-jesis kaj mi denove montris mian brakon. Tiam ŝi demandis al mi: “Kiun vi amas? Vi amas nenion!” .

Poste, ŝi klarigis al mi, ke mankas en tiu frazo la homo kiu ricevas la agon ami. Do, la tatuisto forgesis aperigi la akuzativon. Neniu estas amata per tiu deklaro. Tiam, ŝi forkuris kaj ŝi jam ne deziras revidi min - la akuzito jam ne kapablis paroli plu.

- Mildiable! Ĉu tiu eraro estas tiel grava? Mi, ne scipovanta la lingvon, tamen komprenas perfekte, ke “mi amas vi” povas signifi, ke vi estas amata de mi - la juĝisto pruvis klarigi.

- Mi protestas -la defendanto ekkriis stare - La juĝisto ne rajtas traduki lingvon kiun li ne komprenas.

- Nu, sendube vi pravas -la juĝisto admisiis. - Nu, venigu la knabinon- li ordonis.

Tiam, malfermiĝis la pordegoj de la granda salono. Eniris bela knabino akompanita de policano. Ĉiuj rigardis ŝin atente sed silente, ĝis kiam ŝi stariĝis antaŭ la juĝisto.

- Nu, bonan matenon, Sinjorino - ekdiris la juĝisto. - Mi deziras demandi al vi kelkajn aferojn pri la tatuajo montrita de via fianĉo.

- Ve! Li ne estas mia fianĉo, eĉ ne mia koramiko. Li ne amas min. Eble li amas iun, sed mi ne scias kiun. - La junulino fiere respondis.

La manoj de la juĝisto palpis sian frunton - Nu, respondu fidele kaj detale jenajn demandojn. Kion vi komprenis kiam vi vidis la tatuajon de via fianĉo.. de tiu homo?

-Li, lastmomente korektis la frazon.

- Mi sentis grandan tristecon. Li diris, ke li amis, sed ne kiun li amis... -ploreme respondis la junulino.

- Tamen, ĉu vi ne komprenis, ke li amis vin? Temas pri tre facila frazo kun ege simpla strukturo. “Mi” estas la subjekto; “amas” la verbo kaj fine “vi” agadas kiel objekto. La ordo de la vortoj ja montras ties funkcion sur la frazo. -Nur mankis skrib-tabulo kaj la juĝisto estus profesoro en tiu momento.

- Ne, sinjoro. Eble tion vi povas kompreni, tamen en mia patrin-lingvo la ordo estas tute kontraŭa. Unue aperas la objekto, poste la verbo kaj fine la subjekto. -La junulino klarigis. - Do, tiu frazo ankaŭ povas esti komprenata kiel ordono “Vi amu min”. Neniel li diris, ke mi estas amata de li. Verŝajne pro la fakto, ke li neniam amis MIN. - La junulino substrekis laŭte la lastan vorton kaj la akuzativon oni aŭskultis eĉ ekster la granda salono.

La kapdoloro de lia moŝto povus esti sentata eĉ de la publiko. Tiam li diris: - Nu sinjorino, mi daŭre komprenas, ke “vi” povas esti “vin”.

- Tion vi pensas -respondis la junulino, -sed “vi” estas “vi” kaj “vin” estas “vin”, tio ja estas eterna vero.

La juĝisto ruĝiĝis, verdire li malmulte sciis pri gramatikaj aferoj. - Nu, la akuzito revenu denove antaŭ mi -li ordonis.



Forviŝinte siajn larmojn li denove stariĝis antaŭ la juĝisto.

Nu, mi volas scii, kion vi sentis post kompreni la sencon aŭ ne-sencon de la frazo. - La juĝisto demandis.

La akuzito rapide respondis. -Bone, mi tuj deziris korekti la eraron, do mi iris en la tatu-vendejon kaj mi petis al la tatuisto aldoni literon "n" post "vi". Tiam li diris al mi, ke tio tute ne eblis, ĉar la jino-janga simbolo situis apud la fino de la frazo kaj ne estis eble adicii pliajn literojn al tiu frazo.

- Kaj tiam vi pugno-batis la tatuiston, ĉu ne? -kuriozeme demandis la juĝisto.

- Ho, ne vere tiam -respondis la akuzito. - Tio okazis poste, kiam la tatuisto diris al mi, ke ebla solvo al la problemo povus esti fortranĉi mian brakon.

- Eble tio povus esti taŭga solvo -la juĝisto flustris. En tiu momento li ekpensis pri la redaktota verdikto.

**Ne forgesu aliĝi al la 108-a
Universala Kongreso de Esperanto,
okazonta de la 29-a de julio
ĝis la 5-a de aŭgusto
2023 en Torino (Italio)**



Aliĝi eblas ĉe uk.esperanto.net/2023. Aliĝoj dum la unua aliĝperiodo (ĝis la 31-a de decembro 2022) ĝuas la plej bonajn rabatojn.

La 108-a Universala Kongreso okazos sub la temo:

"Enmigrado: kunfluo de homaj valoroj"



Jura Fakultato en la Universitato de Torino





En kazo de dubo, favore al akuzito.

Temas pri la traduko de la latina sentenco "In dubio pro reo". Eblas esperantigi ĉi tiun latinan principon kiel "*en la dubo, favore al akuzito*". Sur la libro 50-a, titolo 17-a, leĝo 16 aperas jena latin-lingva sentenco, kies aŭtoro estas la juristo Gajo (ĉirkaŭ 120 - ĉirkaŭ 160) :

Semper in dubiis benigniora praeferenda sunt.

En kazo de duboj estas preferinda la plej favora decido.

Laŭ ĉi tiu regulo, se juĝisto aŭ tribunalo, post pristudi la prezentitajn pruvojn, hezitas pri la kulpeco aŭ ne-kulpeco de akuzito, la fina juĝo devas esti favora al li, tiel: en kazo de dubo favore al akuzito. Ĉi tiu sentenco estas intime ligita al la rajto esti konsiderata senkulpa, kiun ĉiuj ĝuas. Tiel, akuzito ne devas pruvi, ke li estas senkulpa, male, la akuzanto devas havigi en la jura proceso pruvojn atestantajn pri lia kulpeco. Se tiuj alportitaj pruvoj ne estas sufiĉe klaraj kaj evidentaj aŭ juĝisto havas seriozajn dubojn pri la vereco de tiuj atestoj, la akuzito ne povas esti kondamnita.

Tamen, inter ambaŭ principoj ankaŭ ekzistas diferencoj. Tiel, la rajto esti konsiderata senkulpa estas akceptata kiel deviga normo en ĉiuj demokratiaj konstitucioj aŭ en pun-juraj leĝaroj, sed la principo pri dubo ne aperas sur normoj, ĉar ĝi temas pri intima konsidero de la juĝisto, kiam oni taksas pruvojn kadre de jura proceso. Ĝi ankaŭ estas konata kiel principo pri racia dubo.

Ni vidu ekzemplon pri aplikigo de la sentenco "en kazo de dubo favore al akuzito":

La Supera Kortumo de Peruo nuligis en la jaro 2021 unua-instancan juĝon, kiu kondamnis homo pro disvendado de drogoj ĉe li. Inter aliaj aferoj, polico trovis en lia domo pezilon, ilo ofte uzita por pezi ekzakte drogojn. Tamen, polico neniam realigis ekzamenon por trovi eblajn drogajn restaĵojn sur la teleretoj de la pezilo, do, reale oni neniam sciis, ĉu pezilo iam utilis por tio. Alie, la akuzito ĉiam asertis, ke lia edzino uzis tiun pezilon, ĉar ŝi vendis

formaĝojn en loka merkato. La apelacia kortumo konsideris, ke la ekzisto de tiu pezilo en la domo de la akuzito ne povis esti konsiderata kiel pruvo por pridubi la sen-kulpecon de la akuzito, do ekzistis raciaj duboj pri tiu kulpeco. Fine, la unua-istanca juĝo estis definitive nuligita de la Supera Kortumo.

La principio "en kazo de dubo, favore al akuzito" en la juraj paradoksoj.

Estas necese antaŭdiri, ke Juro ne estas ekzakta scienco, do, ene de ĝi povas aperi paradoksoj, tio estas, leĝoj kaj normoj kies laŭvorta aplikigo povas konduki al kontraŭdiro. Ni imagu jenan juran paradokson.

Trafika normo devigas al stirantoj halti antaŭ ruĝ-kolora trafiklampo. Samtempe povas ekzisti normo kiu devigas ne haltigi aŭtomobilojn ĉe protektitaj zonoj en urbo, ekzemple antaŭ policejoj, militistaj zonoj ktp. Do, kio okazos se ekzistas trafik-lampo en unu el tiuj lokoj? Ĉu stiranto devas halti aŭ ne kiam la trafiklampo estas ruĝkolora? Jen, jura paradokso.

En ĉi tiaj kazoj la principio "en kazo de dubo, favore al akuzito" estas tre grava, ĉar ĝi estas la aplikenda rezono, kvankam neniu leĝo tion proklamas.

Ni sciu pri alia fama kazo rakontata ene de la mondfama hispanlingva verko "Don Kihoto de la Manĉo" de Miguel de Cervantes:



Antikva prefekto ordonis konstrui ponton super rivero. Li ordonis starigi apud ĝi estradon kaj eŝafodon kun pendumilo. Sur la estrado troviĝis juĝistoj kiuj devus demandi al ĉiuj vojaĝantoj trapasantaj la ponton, kien li iras kaj kun kiu celo. Se la vojaĝanto diris veron, li povus sekvi sian vojon trankvile. Tamen, se li diris malveron li estus kondamnita morti je la pendumilo.

Okazis iam, ke vojaĝanto venis, kiam juĝistoj demandis al li, kien li iros kaj kun kia celo, li asertis:

"Mi iras morti en la eŝafodon."

Juĝistoj ne kapablis solvi ĉi tiun paradokson, ĉar ili troviĝis antaŭ du kontraŭdiroj:

a) Se la vojaĝanto fine mortas sur la eŝafodo, tiam li diris veron, do li ne devus morti pendumita.

b) Se la vojaĝanto daŭrigas sian vojjon kaj li ne mortas pendumita, tiam li diris malveron, do li meritis esti pendumita.

Juĝistoj tiam sendis mesaĝon al Sanĉo Panzo, fidela ŝildisto de Don Kiĥoto, kiu estis nomumita prefekto en tiu loko.

Sanĉo diris unualoke, ke li ne estis klera kaj edukita homo, tamen antaŭ tiu kontraŭdiro ekzistis klara kaj aplikenda solvo. La plej bona rezulto por la viro estus konservi la vivon, do ne morti. Tiel la solvo al tiu jura paradokso estus ne kondamni la vojaĝanton. Li aplikis la principon "en kazo de dubo, favore al akuzito", ĉar ĝi estas la plej taŭga solvo okaze de juraj paradoksoj.



Torino (Italio), sidejo de la 108- Universala Kongreso de Esperanto en la jaro 2023

Galerio de elstaraj esperantistaj juristoj



Maria Pontika
Μαρία Ποντίκα
Greko 1932 ~ 2019

Greka juristo. Prezidanto dum multaj jaroj de Helena Esperanto-Asocio. Membro de la organiza komitato de la 61-a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno 1976. Dum pli ol 60 jaroj konstanta propagandisto de la lingvo Esperanto.



**Kino
kaj**



Juro

Atestanto de la prokuroro

Bazita sur samnoma teatraĵo de la brita verkistino Agatha Christie, ĉi tiu filmo temas pri juĝo de viro akuzita je murdo. Sir Wilfrid Roberts (Charles Laughton) estas prestiĝa advokato. Li estas iom maljuna kaj malsana, do, kuracisto konsilis al li ne daŭrigi sian karieron kiel advokaton. Tamen li akceptas defendi Leonard Vole (Tyrone Power), akuzita je la murdo de S-ino Emily French, maljuna vidvino enamiĝinta en la allogan sinjoron Vole. S-ino French difinis lin heredanton.

Ne-diskuteblaj pruvoj akuzas S-ron Vole pri la murdo. Advokato parolas kun S-ino Vole (Marlene Dietrich), kiu certigas, ke la tagon kiam okazis la murdo, ŝi kaj Leonard Vole estis kunaj. Tamen la advokato konsideras, ke tiu atesto ne estus akceptata de la tribunalo, ĉar ŝi estis lia edzino. Male, prokuroro petas al S-ino Vole atesti kontraŭ sian propran edzon, tamen tio ne povas okazi laŭ britaj leĝoj. Tamen, oni eltrovas, ke ŝi jam estis edziniĝinta kiam denove ŝi edziniĝis al S-ro Vole, do reale tiu edziĝo ne validis el la leĝa vidpunkto, tiel ŝi povus atesti kontraŭ li.



Witness for the prosecution. (1957) Produktita de Arthur Hornblow. Reĝisorita de Billy Wilder. Ĉefaj aktoroj: Tyrone Power, Marlene Dietrich, Charles Laughton, Elsa Lanchester, Una O'Connor, John Williams, Henry Daniell kaj Ruta Lee.

Laŭ deklaro de S-ino Vole, Leonard diris al ŝi, ke li reale murdis la riĉan vidvinon. Kiam la jura proceso preskaŭ finiĝas, mistera virino kontaktas kun la advokato. Tiu virino havigos al la advokato aron da leteroj verkitaj de S-ino Vole al ŝia amoranto, mistera homo nomita Maks. Laŭ la enhavo de tiuj leteroj Christine Vole deziras damaĝi sian edzon, tiel la advokato uzas tiujn pruvojn por malpravigi la deklarojn de S-ro Vole kontraŭ ŝia edzo. Sir Wilfrid sukcesas kaj fine ĵurio konsideras, ke la akuzito estas senkulpa.



Malgraŭ la sukcesa fino la advokato ion suspektas, ĉio iris glate. Kiam la proceso finiĝas, Sir Wilfrid kaj Christine Vole restas solaj en la salono. Tiam ŝi rakontas al la advokato, ke kiam ŝi vidis, ke ĉio estis perdita por ŝia edzo, ŝi inventis tiujn leterojn kiel pruvojn, do, la mistera virino kiu havigis la leterojn al la advokato estis ŝi mem. Ŝi rakontis en tiu momento al la advokato, ke S-ro Vole reale estis kulpa, li murdis la vidvinon. Li venis hejmen kun sang-makuloj kaj li diris al sia edzino, ke li murdis S-inon French. Tamen, Christine Vole estis ĝisoste enamiĝinta en sian edzon, do ŝi estis preta pardoni lin.

En tiu momento Leonard Vole eniras en la salonon, li, jam protektita de la ĵusa juĝo, konfesas al la advokato, ke li murdis la vidvinon. Tiam aperas belan junulinon Diana (Ruta Lee) kiu brakumas S-ron Valen. Christine Vale komprenas, en tiu momento, ke li foriros kun tiu junulino. Sed, antaŭ ol akcepti tion, S-ino Vole murdas sian edzon. Sir Wilfrid komprenas, ke en tiu momento justico realiĝis, do, la edzino ne murdis sian edzon, sed temis pri ekzekuto. Sir Wilfrid proponas sin por agi kiel defendanton de S-ino Vole.



La filmo estis tre bone akceptita. Oni proponis al kelkaj el la aktoroj por ricevi Oskar-premiojn. Kvankam en la filmo aperas kelkaj famaj ĉefroluloj, kiel Marlene Dietrich kaj Tyrone Power, sendube la plej grava rolulo estis la advokato Sir Wilfrid Roberts (Charles Laughton). Lia rolo kaj la ludado de la aktoro en la filmo estis imponaj.



INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO fondiĝis en la jaro 1992 kun la nomo Esperanta Jura Asocio. Ĉi tiu asocio ŝanĝis sian nomon kaj aprobis novajn statutojn en la jaro 2017 kun la nuntempa nomo. Inter aliaj, celoj de IJEJA estas:

- Praktike kaj science uzi Esperanton sur ĉiuj branĉoj de la Juro.
- Videbligi Esperanton en juraj kaj ne-juraj medioj pere de informado kaj interkomunikado.
- Strebi al justeco, laŭleĝeco, homaj rajtoj kaj demokratio, ankaŭ ĉe oficialaj instancoj, naciaj aŭ internaciaj, en la mondo.

Juristoj kaj tiuj kiuj laboras en juraj medioj estas bonvenaj en IJEJA. Ne hezitu aliĝi al Internacia Jurista Esperanto-Asocio.

ALIĜU AL INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

Kiu rajtas esti membro de I.J.E.A.?

- Ordinara membro: devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.
- Membro-studento: devas studi por licenciigo pri Juro.
- Membro-staĝanto: devas staĝi en jura profesio.
- Membro-korespondanto: devas utile kunlaboradi kun la Asocio, ĉu esperanto, ĉu alilingve, jen spontane, jen laŭ invito de la Asocio.

Kiel aliĝilo plenumu la sekvantan paĝon kaj sendu ĝin al
jurista@esperanto.ac

Kotizoj.

La jara kotizo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latin-Ameriko. Se vi loĝas en alia lando la kotizo estas 14 eŭrojn.

Membro-studentoj aŭ membrostaĝantoj pagas neniom.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r. Ankaŭ oni povas aboni la jaran kotizon rekte okaze de la Ĝenerala Asembleo kiu ĉiu-jare okazas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia adreso: *jurista@esperanto.ac*





Internacia Jurista Esperanto-Asocio I.J.E.A.

ANIĜILO / MEMBRILO

Foto

Antaŭnomo:

Familia nomo:

Profesio:

Poŝtadreso:

Retadreso:

@

Urbo:

Lando:

Nacieco:

Kategorio de estonta asociano: ordinara asociano jurstudento
staĝanto korespondanto

Mi, pere de ĉi tiu peto, kandidatiĝas al la statuso de membro de IJEA obeonte ties statuton kaj pagonte la ĉi-suban kotizon.

Jarkotizo (se ordinara membro de ne-esceptaj landoj) 14 eŭroj
(se ordinara membro de iamaj socialismaj
orient-eŭropaj landoj, Azio -escepte Koreio,
Japanio kaj Israelo), Afriko kaj Latinameriko..... 7 eŭroj

Pagmaniero: Eblas ĝiri al UEA-konto **ejax-r**

Subskribo de la kandidato

Decido pri la kandidateco
per subskribo de IJEA estrarano

Sekretario-Kasisto: jurista@esperanto.ac
Prezidanto: mfb@debastosadvogados.com

**Internacia Jurista Esperanto-Asocio
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo**